



FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

ENHAVO :

La Interna Ideo. — Printempa Kanto. — Edgard Poe :
La Ovala Portreto. — 1830-1930. — Letero el Kata-
lunujo. — 1a Flandra Kongreso de Esperanto. —
Gratuloj. — Esperantuja Kanto. — Esperantistoj,
juĝu ! — Fariseoj. — Catalans ! — Esperanto-Ekzam-
enoj. — Flandra soldato rifuzas obei francajn ordon-
ojn. — El "La Liberiĝo de la Nacioj !" — Flandra Ligo
Esperantista. — Bibliografio. — Ricevitaj Revuoj. —
Inter Ni. — Lingvo kaj Idiomoj. — Subteno.

JARA ABONPREZO : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

Tarifo por anoncoj : 1/1 paĝo, fr. 125.— ; 1/2 paĝo, fr. 70.— ;

1/4 „ , fr. 40.— ; 1/6 „ , fr. 30.— ;

1/8 „ , fr. 25.—. Perantoj ricevas rabaton.

FLANDRA ESPERANTISTO

Organo de la Flandra Esperanto-Movado

APERAS ĈIUMONATE.

Redaktoro kaj Administranto :

JAN VAN SCHOOR

Julius De Geyterstraat, 149/1, Antwerpen.



Jara abonprezo : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.
Poŝtĉeko : 1735.09

LA INTERNA IDEO.

“La interna ideo de Esperanto estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkiutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton. Ĉio, kio estas super tiu interna ideo de Esperanto estas nur privataĵo, kiu povas eble esti *bazita* sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata kiel *identita* kun ĝi.”

(D-ro L. Zamenhof ĉe la malfermo de la 8a. Kongreso en Krakovo 1912.)

Je la bela tago, kiam Esperanto estos triumfanta kaj ĉiuj esperantistoj estos restintaj fidelaj al la supre citita interna ideo, tiam certe la mondpaco ne plu estos utopio.

Komuna lingvo sendube alproksimigas la homojn, la popolojn, la gentojn, unujn al aliaj.

“Nekonate estas neamate”, diras flandra proverbo. Kaj ĉi tio ankaŭ estas vera por la interpopolaj, la internaciaj rilatoj.

Tamen, internacia interfratiĝado devas esti bazita sur justeco. Vidi en sia proksimulo nur homon kaj fraton, signifas i. a. : deziri kaj klopodi, ke tiu proksimulo estu tiel libera kiel vi mem. En la nuna neesperantista aŭ eĉ kontraŭ-esperantista mondo, nur perforto decidas, ĉu popolo estu kulture aŭ politike libera, ĉu ne.

Ŝovinismo regas ĉiuloke. Oni rifuzas vidi proksimulojn en homoj, kiuj parolas alian lingvon aŭ havas aliajn morojn kaj evidente la malamo ĉiam ree triumfas kaj reaperas nova milito.

La batalo, kiun ni, flandraj esperantistoj, komencis, kompreneble estas almenaŭ parte privataĵo, kvankam bazita sur la interna ideo.

Ni batalas kontraŭ la militarismo, kontraŭ la imperialismo; ni simpatias kun ĉiu movado, kiu volas liberigi iun subpremitan popolon, ĉar ni volas justecon, justecon!

Ni batalas kontraŭ la militarismo:

Forigu la soldatarojn kaj la milito iĝos neebla!

Forigu la armadon kaj por pli bonaj celoj uzigu la grandegajn monsumojn, kiujn ĉiu registaro hodiaŭ bezonas por aĉeti la plej krue-lajn armilojn, por konstrui ĉiuspecajn fortikaĵojn, por nutri centmilojn da soldatoj; uzigu tiujn trezorojn por la instruado de la popolo, por subteni arton kaj industrion.

Ni batalas kontraŭ la imperialismo:

La prosperado de nacio ne dependas de aneksado de iu regiono, kiu antaŭe apartenis al najbara ŝtato.

La vera paco neniam aperos en la mondo tiel longe, kiel popolo sin sentos minacata de iu alia.

La popoloj devas desegni la landlimojn, ne la ŝtatoj la popol-limojn. Se la ŝtatoj interkonsentus pri tiu principo, la imperialismo estus morta kaj depost tiu momento ankaŭ ne plu ekzistus subpremataj popoloj. Ĉar tiam ĉiu nacio, ĉu granda, ĉu malgranda vivus libere, vivus sian propran vivon per propra lingvo kaj super tiu paca mondo brilus la verda stelo.

Pacemaj landoj komprenos la necescon de Esperanto, tiu cemento, kiu unuigos la popolojn.

POL VARENS.

Flandra Kanto Esperantigita PRINTEMPA KANTO.

Teksto de G. ANTHEUNIS.

Muziko de W. DE MOL.

Super la vilaĝet'
Ekmalheliĝis,
Per la aervarmet'
Vesper' beliĝis.

Kamparon iris li,
Ŝi lin renkontis;
Ruĝeta iĝis ŝi,
Ambaŭ silentis.

L'unua kiso nun
Spruĉis el koro,
Dolĉa kiel vesper',
Kiel majfloro.

Sopiris dolĉe li,
Ŝin rigardante;
La antaŭtukon ŝi
Prenis faldante.

Maneton premis li
Al ŝi malmole
Kaj lian premis ŝi
Kvazaŭ nevole.

REKANTAĴO.

Kantadis la birdet',
Odoris la floret',
Estis printempa gaj',
Estis la Maj'.

Tradukis OSCAR VAN SCHOOR.

MONDLITERATURO.

La Ovals Portreto

de Edgard Poe (*)

La kastelo, en kiun mia servisto riskis enrompi, por ke mi ne estus devigata pasigi la nokton sub libera ĉielo, estis unu el tiuj konstruaĵoj, kies grandiozo estas miksata per malgajeco kaj kiuj, dum malrapidaj centjaroj, staris meze de la Apenina montaro, same en la realeco kiel en la fantazio de mistress Radecliffe. Laŭ ĉia versaĵneco, ĝi estis forlasita nur dum kelka tempo kaj antaŭ nelonge. Ni enloĝigis nin en la plej malgranda kaj la malplej luksege meblita ĉambro. Ĝi estis en turo malproksima de la kastelo. Ĝia ornamado estis riĉa, malgraŭ ĝia kaduka kaj malnova stato. La muroj estis kovritaj per tapetoj kaj ornamitaj per multnombraj kaj diversaj armilkolektoj kaj ankaŭ per eksterordinara nombro da modernaj pentraĵoj, efektive plenaj je vivo, en framoj luksigitaj per orumitaj arabeskoj. Tiuj pentraĵoj - ne nur pendigitaj sur la muraj partoj kun la plej granda supraĵo, sed eĉ en la multaj anguloj, kiuj rezultis el la stranga arĥitekturo de la ĉambro, — tiuj pentraĵoj do, per efiko de pligrandiĝanta emocio, estigis en mi specon de sorĉa allogo. Ĉar jam mallume estis, mi al Pedro ordonis fermi la pezajn fenestrokovrilojn de la ĉambro, ekflamigi ĉiujn brakojn de granda kandelungaro, kiu staris apud mia lito, kaj forŝovi la kurtenojn el nigra veluro, kiuj ĉirkaŭis la liton. Tiuj aranĝoj celis permesi al mi, kiam mi ne povus dormi, ĝue rigardadi laŭvice la pentraĵojn kaj legi verketon, trovitan sur la kapkuseno kaj kiu kritikis kaj klarigis tiujn pentraĵojn. Longtempe, longtempe mi legis; pie mi rigardis. La horoj forflugis dum rapida belbrilegeco kaj la profunda noktomezo subite alvenis. Ĉar la kandelungaro ne estis metita laŭ mia plaĉo, mi etendis mian manon, tre singardeme, por ne interrompi la dormon de mia servisto kaj mi ĝin metis tiel, ke ĝi ĵetu siajn radiojn pli rekte sur la libron.

Sed tiu gesto havis efikon, kiun mi tute ne povis antaŭvidi: la lumo de la vaskandeloj — ili estis multnombraj — falis nun en angulon

(*) Edgard Allan Poe, la fama amerika verkisto, naskiĝis en Boston en 1809 kaj mortis en Baltimore en 1849. Same kiel lia vivo, lia genio estis turmenta kaj dolora. Lia imago, ekscitita per la alkoholo, plej volonte vagadis en infernaj konceptoj kaj lia analiza talento majstre priskribas terurajn sentojn. Kvankam Poe estas ĉefe konata pro siaj "Eksterordinaraj Historioj", li ankaŭ estis genia poeto; inter liaj poemoj estas veraj perloj, kiel la stranga "La Korvo".

de la ĉambro, ĝis tiam mallumigita per la ombro de unu el la fostoj de la lito. Pentraĵo, kiun mi ne jam vidis, ekaperis en plena klareco. Estis la portreto de juna fraŭlino baldaŭ mature viriniĝonta. Mi ekrigardis tiun pentraĵon kaj tuj mi fermis la okulojn. Kial? Mi ne tuj komprenis. Sed, tenante la palpebrojn ŝlositajn, mi demandis kial mi ilin fermis. Estis senkonscia movo por lasi al mi la tempon por pripensi, la tempon por certigi min ĉu ne estis vida iluzio, la tempon por kvietigi mian fantazion kaj ĝin prepari por pli trankvila kaj pli efika pririgardado. Post kelkaj momentoj mi rerigardis la portreton, streĉe ĉi tiun fojon.

Nun, eĉ se mi volus, mi ne povus dubi pri la atesto de miaj okuloj. Ĉar la unua radio de la kandeloj sur tiu pentraĵo havis la efikon forigi la revan mirkonsterniĝon en kiun miaj sentoj estis enprofundiĝintaj kaj samtempe min revenigi al la kutima vivo.

La portreto, mi jam diris, estis tiu de juna fraŭlino. Estis nur la kapo kaj la ŝultroj, vinjete pritraktita laŭ teknika esprimo kaj videble pentrita laŭ la stilo de Sully. La brakoj, la brusto kaj eĉ iom el la ĉarma hararo fondiĝis nesentiĝeble en la neprecizan sed tamen profundan ombron, el kiu konsistis la fono. La kadro estis ovala, luksege orumita kaj filigranita laŭ la maŭra maniero. Kiel arta produkto, oni ne povis imagi ion pli mirindan ol la pentraĵo mem. Sed eble estis nek ĝiaj kvalitoj de efektivigo nek la senmorta beleco de la fizionomio, kiuj estigis en mi tian subitan kaj fortan emocion. Mi ankaŭ ne povis supozi, ke mia fantazio forprenita de sia dormeto, estus preninta tiun vizaĝon por tiu de vivanta virino. Mi min mem tuj certigis, ke la maloftaĵoj de la desegnaĵo, la vinjetmaniero, la formo de la kadro tuj forigos tian ideon. Atenteghe pensanta pri tiuj diversaj aferoj, mi restis eble tutan horon, duone kuŝanta, duone sidanta kun la okuloj fiksitaj sur la portreton. Fine mi komprenis la veran sekreton de la impreso, kiun tiu portreto faris sur min kaj mi min refaligis sur la liton. Mi ekkonsciis, ke la magio de tiu pentraĵo rezultis el la vivesprimo, tute simila al la vivo mem. Unue mi tremis pro tio, fine mi restis konfuzo emociita, konsternita. Turmentita pro tiu fortega kaj respekta emocio, mi remetis la kandelaron sur ĝian antaŭan lokon. La objekto de mia febra agitado estante tiamaniere kaŝita antaŭ miaj rigardoj, mi pasie prenis la libreton, kiu preparolis tiujn pentraĵojn kaj ilian historion. Mi turnis la foliojn ĝis la numero, kiu temis pri la ovala portreto kaj mi legis tiun strangan kaj misteran raporton: "Ŝi estis fraŭlino eksterordinare bela kun tiel afabla kiel gaja karaktero, ŝi ekkonis la pentriston, lin amis kaj edziniĝis kun li, kiu pasie amis sian duan edzinon: sian arton. Sed ŝi amis ĉion kaj nur malamis la arton, kiu estis ŝia konkurantino. Ŝi nur timis la paletrojn kaj la penikojn kaj ĉiujn ilojn, kiuj forigis de ŝi la

vizaĝon de la amato. Do estis teruraĵo por la sinjorino, kiam la pentristo ekvolis pentri la portreton de sia juna edzino mem. Sed ŝi estis humila kaj obeema kaj dum multaj longaj semajnoj ŝi sidis tre malĝoja, tre dolĉa en la alta mallumeta salono de la turo, kie la taglumo falis nur sur la blankan, pentrotan tolaĵon. Sed la pentristo metis tutan sian artemon en sian laboron, kiu ĉiutage, ĉiuhore pli kaj pli progresis. Kaj estis homo pasiema, silentema, kiu perdiĝis en siajn revojn. Tiel eĉ, ke li ne rimarkis, ke la lumo kiu tiel pale falis en tiun turon velkigis la sanon de lia edzino. Ĉiuj vidis ŝin malfortiĝanta, sed ne li. Tamen ŝi ĉiam ridetis, ŝi neniam plendetis, ĉar ŝi vidis ke la fama pentristo trovis pasiegan, febran ĝuon, farante sian taskon. Kaj vere ĉiuj, kiuj venis por vidi la portreton, mallaŭte rimarkigis unu al la alia la perfektan similecon.

Sed fine, kiam la laboro estis preskaŭ finita, estis al neniu permesate eniri en la turon; la pentristo pro la blinda fervoro nur tre malofte deturnis siajn okulojn de la pentraĵo. Kaj li ne volis vidi ion alian krom la koloroj, kiujn li pentris sur la pentraĵo; li ilin ĉerpis el la sano de tiu, kiu sidis antaŭ li.

Kaj kiam multaj semajnoj estis forpasintaj kaj kiam lia laboro estis preskaŭ tute finita, la animo de la sinjorino ŝanceliĝis kiel la flamo en lanterno. Ankoraŭ tie kaj ĉi tie plibonigon kaj li finis. Dum kelkaj momentoj la pentristo ekstaze alrigardis sian laboron, sed dum li ĝin fikse rigardis, jen li subite iĝis tre timema kaj tre pala, li estis konsternita; kaj li per terura voĉo ekkriis: "Estas ja la vivo mem!" Tuj li sin turnis al la amatino: *Ŝi estis morta.*

Esperantigis EDGARD VERHEYDEN.

1830 - 1930.

Funebra Datrevena Festo por la Flandioj.

C. — EN LA ARMEMO. (Daŭrigo).

1916-1918: En la pŭnkolonioj en Fresnes, Auvours, Ruchard, Orléans, Calais, k.t.p., 90% el la punitoj estas Flandroj. En Fresnes, super la enirejo de la malliberejo estis skribite: „Ĉi tie oni eniras kiel leono kaj eliras kiel ŝafido!”

Je la enkarcerigo la knaboj estis antaŭe batataj de 4 viroj per kaŭĉukbastonoj. Dua tombejo estis necesa...

El „Vlaanderens Weezang aan den IJzer”: „Ĉiuj soldatoj el la ekzerco-kampo de Auvours povas atesti, ke la malliberuloj serĉis la pankrustojn ĝis en la malpuraĵoj por malakrigi sian mal-saton.”

D-ro Van de Perre en raporto al la militestraro pri vizito al la disciplinkompanioj ekkrias: „Justecon! Justecon!! Justecon!!!” D-ro Fr. Daels ne kuraĝas elparoli la nombron de tiuj, kiuj pereis pro malsato, kiuj freneziĝis aŭ memmortigis sin. Nenombreblaj malfeliĉuloj forrabis la nutraĵon de la gardhundoj, manĝis herbon... La gluaĵo por papersakoj, — kvankam ĝi enhavis petrolon estis bonvena nutraĵo. Centoj blindiĝis pro senfortiĝo.

Ĉar li estis kantetinta flandran kanton en sia karcerero, malliberulo estis kraĉata en la vizaĝon de la provoso, poste kun helpo de 2 gardistoj, bategata per matrakoj kaj fine nokte nude trenata sur la korton, kie li estis mortigata per piedfrapoj (Fresnes).

Al servemaj kamaradoj la valona milita pastro Servranckx kuraĝis diri: „Kial kompati ilin (la Flandrojn)!!... Estas nur bestoj en homvestaĵoj.” (Auvours.)

La flandra milita pastro, D-ro Paul Vandermeulen, estis skribinta ke oni objektive devis prijuĝi la agadojn de la aktivistoj. Li estis ekzilata al la rokinsulo Cézembre. Post forta protesto li estis translokigata al la hospitalo St. Lunaire, kie li devis purigi la plankojn, telerojn, necesejojn...

El la „Zwartboek” de „IJzergalm”:

„La intelektaĵoj flandremuloj, — advokatoj, studentoj, ekleziuloj, — prefere estis sendataj al la punkkompanioj en la arbaroj de la Orne. Dumtage ili estis devigataj faligi 5 ĝis 6 arbojn kaj pechaki ilin po 5 ĝis 10 centimoj por horo. La plej eta ripozo dum tiu sklava laboro — je profito de la grand-industriuloj — estis punata per 8-taga restado en mallumaj keloj.

1919 El „Nieuwe Rotterdamsche Courant” de la 5a. de Aŭgusto:
„Du blindaj soldatoj, gvidataj de virino, demandis en la Norda Stacidomo en Bruselo, 3a. klasan bileton por Gento. La oficisto deklaris ne kompreni la flandran, kaj ke ili nur devis lerni la francan. Kolere li aldonis: „vi ne ricevas bileton!” Ĉeestantoj, trafataj per tiu skandala sintenado, defendis la knabegojn. Pli altranga oficisto aprobis la bileton kaj la knabegoj ne ricevis bileton...”

1924 El „De Standaard” de la 23a. de Septembro: „Estis nur Flandro” — Okazis en Kortrijk. Kaporalo de la 3a. regimento de la infanterio, ordonis france deĵoraĵon al flandra soldato, Gustaaf van Meenen, el Severen. Ĉar ĉi tiu ne komprenis la francan, li estis insultata, kaptata ĉe la nuko kaj tiel terure sufokata, ke li terenfalas kaj dum kelkaj minutoj senkonscie restis kuŝanta. Lia nukmuskolo estas nuntempe tute lama kaj lia kapo rigida sur liaj

- ŝultroj. La regimenta kuracisto ne kapablinta kuraci lin, forkondukigis lin al la milithospitalo por ekzameno per X-radioj. La krimulo nur estis sensignife punata: nur kelkaj tagoj da ĉambroaresto.”
- 1926 Sur la belga militŝiparo la eduko okazas france de francaj militŝiparaj oficiroj.
- 1928 La 31an. de Oktobro. Lode Bonten, de la klaso de 1926, estis envicigata ĉe la grenadistoj, Kazerno „Prins Albert” en Bruselo. Li antaŭe estis deklarinta per letero al la ministro ke li neniam plenumus francan ordonon. Post ĉiuspecaj incitoj kaj instigoj sin deteni de tiu „suĉinfanaĵo,” oni klarvide ne trovis elturniĝon el tiu afero, kaj pretekstante iaman operacion... Bonten estis sendata por ĉiam hejmen.
- 1929 Ordonon numero 20 de la 12a. de Aŭgusto portas la „Vlaamsche Huizen” (Flandraj Hejmoj) sur la oficialan liston de la prosti-tuejoj, kies eniro estas malpermesata al la soldatoj!

K. A.

LETERO EL KATALUNUJO.

La multlingveco en la ĉiutaga vivo.

Multaj personoj kredas, ke la problemo pri multlingveco ekzistas preskaŭ nur en Mezeŭropo, kaj ke en Okcidenta Eŭropo la lingvaj interrilatoj estas simplaj kaj nekomplikitaj.

Nu, por Barcelonano troviĝas en strataj gazetvendejoj la jenaj publikaĵoj plurlingvaj: *La Gaceta Literaria*, aperanta en Madrido, duonmonata, pri literaturo, arto kaj scienco, en lingvoj hispana, portugala kaj kataluna; *Oc*, aperanta en Toulouse, semajna, pri literaturo kaj politiko, en lingvoj provençala, franca kaj kataluna; *La Revue de Catalogne*, aperanta en Marseille, monata, pri literaturo kaj arto, en lingvoj franca kaj kataluna; *Criterion*, aperanta en Barcelono, trimonata, pri filozofio, en lingvoj kataluna kaj latina; *Ciència*, aperanta en Barcelono, monata, ĉefe en lingvo kataluna kaj en aliaj latinidaj; *El Correo Catalón* kaj *El Diluvio*, ĵurnaloj, en lingvoj hispana kaj kataluna; *L'Eveil Catalan*, ĵurnalo, en lingvoj franca kaj kataluna; *El Dia Gráfico*, ĵurnalo en hispana lingvo, kun resumoj en lingvoj franca kaj angla.

Oni devas ankaŭ mencii, ke en Katalunujo aperas ekskluzive en kataluna lingvo la jenaj semajnaj aŭ monataj gazetoj: *Revista de Catalunya*, politiko; *La Nova Revista*, literaturo kaj arto; *D'Ací d'Allà*, magazeno; *Gasete de les Arts* kaj *L'Amic de les Arts*, arto; *La Pa-*

raula Cristiana, religio; *Mirador*, literaturo, arto kaj politiko; *L'Opinió*, socialismo; *Vibracions*, muziko; *Radio-Lot*, radiofonio; *L'Escena Catalana*, teatro; *Revista de Poesia*, poezio; *Llegiu-me*, por junuloj; *La Dona Catalana*, por virinoj; *En Patufet*, por infanoj; *Xut* kaj *La Nau-dels Esports*, sporto; *L'Esquella de la Torratxa*, politika satiro; *Excursionisme, Agricultura, Economia i Finances*, kaj multaj aliaj revucj pri ĝeneralaj aferoj, aperantaj en diversaj urboj, kaj bultenoj de specialaj societoj. Aliaj similaj gazetoj aperas en Katalunujo ankaŭ en hispana lingvo.

Koncerne ĵurnalojn, el la grandaj rotativoj aperantaj en Katalunujo estas kvar nur en kataluna lingvo kaj kvin nur en lingvo hispana.

La produktado de libroj estas ankaŭ duonigita inter la kataluna kaj hispana lingvoj. Kurioze estas, ke la katalunaj eldonistoj en hispana lingvo prefere konkeris la Amerikan merkaton. En la grandega (70 dikaj volumoj) *Enciklopedio Espasa* hispanlingva, eldonata en Barcelono, ĉiu vorto havas tradukon katalunan, portugalan, francan, italan, anglan, germanan kaj esperantan:

Pri spektakloj ni diru, ke nuntempe funkcias en Barcelono ses teatroj en kataluna lingvo kaj du en hispana, en la kabaredoj oni kantas ankaŭ france, en la operejo ĉefe itale, kaj en la parolanta kino oni aŭdas anglan lingvon. Plie, teatraj prezentadoj france kaj itale ne estas maloftaj.

La du sendstacioj *Radio-Barcelona* kaj *Radio-Catalana* radias hispane kaj katalune, kaj ili okazigas kursojn pri esperanta, franca, angla kaj germana lingvoj.

La *Fundació Bernat Metge*, kiu eldonas la klasikajn aŭtorojn grekajn kaj latinajn en tri eldonoj: Originala kaj kataluna — Nur originala — Nur kataluna, okazigas senpagajn diversgradajn kursojn pri lingvoj latina kaj greka. Tio estas farata eksteroficiale, simile kiel ni esperantistoj instruas la Zamenhofan lingvon.

Ankaŭ senpage, la *Alliance Française* instruas francan lingvon; societo *Dante Alighieri* la italan; kaj en komercaj rondoĵoj oni disvastigis la araban (vulgaran) por interrilato kun Nordafriko. Kelkaj studemuloj okupas sin pri hebreaismo, kelkaj teozofistoj ŝatas la orientan kulturon, kaj kelkaj komunistoj lernas la rusan lingvon.

Anaŭ tiom da lingvoj altirantaj la atenton de la popolamaso, ne estas strange ke eĉ multaj simpatiantoj kun la ideo de lingvo internacia ne tuj lernas Esperanton. Komprenante tion, ni ĉefe akcentu en nia propagando la allogecon de la Zamenhofa kreaĵo kaj ne timu aserti la multrilatan superecon de nia lingvo, jam en ĝia nuna formo.

JAUME GRAU CASAS, L. K.

1a FLANDRA KONGRESO DE ESPERANTO

Antverpeno. 7an-8an-9an de Junio 1930.

Honora Prezidanto: S-ro Frans Van Cauwelaert, urbestro.

S-ro FRANS VAN CAUWELAERT,

la honora prezidanto de nia 1a. Flandra Kongreso de Esperanto.



S-ro Frans Van Cauwelaert naskiĝis en 1880 en Maria-Lombeek; li estas la frato de la konata flandra poeto August Van Cauwelaert. Li studis leĝosciencon en Lovano kaj estis de 1907 ĝis 1909 profesoro ĉe la universitato de Freiburg (Svisujo). En 1910 la Antverpenanoj sendis lin al la parlamento kaj de post 1919 li estas ilia urbestro. S-ro Frans Van Cauwelaert estas sperta ŝtatisto kaj la gvidanto de la Flandraj Katolikaj Parlamentanoj.

*
* *

La kongreso pli kaj pli alproksimiĝas, niaj esperoj pli kaj pli efektiviĝas!

Multajn aliĝilojn ni jam ricevis; tamen estas ankoraŭ multaj, kiuj devas sendi sian aliĝilon kaj atendas kaj malfaciligos la laboron de la kongresa oficejo. Flandraj samideanoj, ne atendu ĝis la lasta momento kiel kutime!

El Bergen-op-Zoom oni sciigis al ni, ke la tieaj samideanoj venos 20-ope al nia kongreso! Ili estos bonvenaj!

Ni ankaŭ nun povas sciigi, ke lia monaĥa Moŝto De Coene

predikos esperantlingve dum la Diservo kaj ke la kongresanoj estos oficiale akceptataj de la urbestro.

Legu la programon kaj diru ĉu ĝi plaĉas al vi!

PROGRAMO.

Sabate.

- 7a. Malfermo de la akceptejo en la salono Van Wezenbeke, Van Wezenbekestraat.
- 8a. Kabaredvespero, en la sama salono.

Dimanĉe.

- 9a. Esperanta Diservo. Prediko de lia monaĥa Moŝto De Coene.
- 10a. Oficiala akcepto en la urbodomo.
- 11a. Laborkunsido en la Reĝa Ateneo, Victorieplaats.
- 1a. Fotografado de la Kongresanoj antaŭ la flandra Operejo.
- 2a. Festeno en la restaŭracio Verlaet, Sint-Jansplaats (prezo : 25.- fr.).
- 4a. Promenado tra la urbo.
- 8a. Arta koncerto kaj reprezentado de "Bietje" en la salono "Patria", Lange Leemstraat.

Lunde.

- 9a. Vizito de la Urba Navigacia Muzeo, gvidata de la muzeestro.
- 10a. Vizito al la mondekspozicio.
- 8a. Adiaŭa vespero.

Ci tiu programo reaperos kun ĉiuj detaloj en nia sekvonta numero.

Mendu niajn propagandajn glumarkojn kaj poŝtkartojn!

Propagandu inter viaj flandraj samideanoj por ke ili venu dum Pentekosto al Antverpeno!

Flandraj esperantistoj, via loko estas inter samgentaj samideanoj, via devo estas aliĝi al flandra kongreso kaj helpi al ĉi ties sukceso!

Pentekosto 1930 devas iĝi dato en la historio de la nialanda esperanto-movado, devas iĝi la deirpunkto de nova, plijunigita propagando por Esperanto en Flandrujo!

GRATULOJ.

— Al s-ro E. A. Hansch, la fervora subtenanto de Esperanto el Oude-God, kaj al lia estimata edzino pro naskiĝo de fileto Kristiano.

— Al nia amiko Walter Boumans, membro de Flandrema Grupo Esperantista, kiu edziĝis la 29an. de Aprilo kun Johanna Croquet. Al la juna paro ni deziras multan feliĉon!

— Al niaj geamikoj Frits Moors kaj Hilda de Koning, kiuj edziĝis la 26 an. de Aprilo. Multan feliĉon kaj prosperon!

ESPERANTUJA KANTO.

Mi amas vin, Patrujo mia,
Sen horizont', sen ia lim'.
Patrujo mia kaj la via,
Pri kiu ĝojas la anim'.
Mi vidas flirti la standardon,
La blankan fonon kun la stel';
Mi sekvas ĝin, sentante ardon
Pro ĵuro sankta de fidel'.

Mi amas vin, Patrujo mia,
Loĝejo de diversa ras',
En kiu lingvo Zamenhofa
Ne igas plu en embaras';
Mi respektadas vian teron,
Patrujo kara de l' homar',
Konscias plene mi la veron:
En mondo loĝas nur fratar'!

CATH. J. ROSKES-DIRKSEN.

ESPERANTISTOJ, JUGU!

La 29an. de Marto, kiam nia Aprila numero estis ĵus forsendita, ni ricevis de s-roj Frans Schoofs kaj Maur. Jaumotte, nome de la "Belga Esperanto-Instituto", la sekvontan registritan kaj rapidkurieran "rajton je respondo":

Antverpeno, la 28an. de Marto 1930.

Al S-ro Jan van Schoor,

Redaktoro-Administranto de

"*Flandra Esperantisto*",

Julius De Geyterstraat, 149/1,

Antwerpen (Kiel).

Sinjoro Redaktoro-Administranto,

Ni hazarde ricevis la Martan numeron de la revuo "Flandra Esperantisto", kies redaktoro-administranto vi estas kaj kiu enhavas sur siaj paĝoj 135, 138 kaj 139 artikolon "La Okuloj malfermiĝas", en kiu vi represas kun komentarioj, artikolon el la publikaĵo "Nia Informilo" (Januaro 1930) eldonita en Kortrijk.

Se ni, en la unua momento, kiam tiu publikaĵo aperis, povis konsideri, ke la eldonanto en Kortrijk pekis pro nekomprene de la aferoj, ni nun tamen devas konstati, ke la celo, kiun vi volas atingi per la represo estas nepre malutili al nia komerca firmo. La fakto, ke vi kreis organizaĵon "Flandra Esperanto-Instituto", kun sama celo kiel nia firmo, flanke de la propagandaj organizaĵoj, montras, ke vi bone kapablas fari la distingon, kiun la Kortreja eldonanto ŝajne ne kapablis fari. Via celo malutili, kaj tiel malhoneste favori la firmon de vi kreitan, kaj kies anonco aperas en sama numero, estas do tute klara.

Tial, laŭ la Belga leĝo kaj sekve al artikolo 13 de la Dekreto de la 20a. de Julio 1831, ni postulas de vi, ke vi en via plej proksima numero, t. e. tiu de Aprilo, aperigu la respondon ĉi tian, kiu povas enhavi la duoblan amplekson de la artikolo de vi presita. Ni diras: en la numero de Aprilo, ĉar de la momento kiam vi ricevis tiun ĉi leteron, restas al vi la du tagoj, pri kiuj parolas la ĉi supra dekreto.

Kvankam por eksterstaranto povus esti pli malpli malfacile, apartigi la funkciadon de la diversaj Esp.-organizaĵoj en Belgujo, la celo de nia respondo estos tamen nur: refuti la argumentadon, kiu estas farita speciale kontraŭ "Belga Esperanto-Instituto".

Kiam en 1926, "Belga Esperanto-Instituto" estis kreita kun tre malgranda kapitalo, la plej unua celo estis renovigi kaj pliampleksigi iom post iom la propagandan materialon Esperantistan en Belgujo, kaj ĉefe krei la neekzistantan flandran propagandilaron. La nominala kapitalo, kiu estis Fr. 12.500,— el kiuj nur la kvinono estis pagita, ne permesis efektiviĝi en la unuaj momentoj la tutan programon, kiun la Administrantaro fiksas al si. Ni presis kaj represis en ambaŭ naciaj lingvoj la elementan gramatikon, konatan sub la nomo "Ruĝa Broŝuro", ni fabrikigis malmultekostajn insignojn de diversaj modeloj, ni iom post iom eldonis ilustritajn poŝtkartojn kun Esp.-teksto pri la plej grandaj urboj belgaj, ni re-eldonis la "Flandra'n Fundamento'n", fine ni aperigis la du volumojn de "Belga Antologio", grava verko pri flandraj kaj franclingvaj belgaj aŭtoroj.

La kapitalo, pri kiu ni disponis kaj kiu feliĉe pro la fido, kiun nia laboro alportis al nia firmo, kompreneble ne estis de la unua momento tiom granda por ke ni estus povintaj efektiviĝi niajn projektojn tiom rapide, kiom ni deziris, kaj tre certe okazis prokrastoj, kiujn ni mem unue bedaŭris, sed ni tamen ĉiam havis la konsciencrankviligon, ke tio, kio ne efektiviĝis tuj, ne povis esti tuj efektivigata kun la rimedoj teknikaj je nia dispono.

Dank' al la ĉiam kreskanta fido de la Belga Esperantistaro, nia kapitalo regule kreskis ĝis Fr. 120.000 subskribita, kaj Fr. 82.700,— pagita kapitalo.

Ĉiuj komprenos, ke tio estis ebla ne nur pro malgrandaj subskriboj sed pro efektive gravaj kontribuoj de kelkaj el niaj amikoj en la lando. Kaj de tiu momento pli ol iam, ni, ĉiam laborante sur la Esp.-kampo, havis kiel taskon (ni diru kiel devon) rentumi la monon enmetitan en nian firmon. Tiuj kiuj pri tio faris aŭ faras riproĉojn al nia societo, montras ke ili nenion komprenas pri la vivo de movado kiel la nia. Ĉiuj Esperantistoj verŝajne estas pretaj oferedoni iom da mono, sed kiam kapitaloj estas bezonataj, tio kompreneble estas nur ebla kiam

oni povas garantii aŭ almenaŭ duon-garantii honestan rentumon de la pruntedonitaj sumoj.

Tion ni diras nur por klarigi, ke estas absurde, postuli de ni, ke ni liveru la librojn, kiujn ni en grandaj kvantoj aĉetas aŭ kiujn ni presas, je la prezo mem, je kiu ni ilin aĉetas aŭ pagas.

Ĉiu scias, ke se firmo eldona aĉetas grandan kvanton de unu libro de la eldonanto, ĝi akiras tre gravan rabaton. Se do, kiel temis pri la Schidlof-vortaro, "Belga Esperanto-Instituto" enmetis milojn da frankoj por aĉeti grandan kvanton de tiuj vortaroj, ĝi do ankaŭ akiris grandan rabaton. De tiu rabato tamen ĝi devas, se ĝi volas vendi la librojn, cedi al la revendistoj-libristoj kaj al la profesoroj parton pli aŭ malpli gravan. Por la libristoj kompreneble tiu procento estas multe pli granda ol tiu por la profesoro, kies rabato estas ĉiam kaj en ĉiuj fakoj 10 %.

Kiam do Kortrejka samideano mendis ĉe kortrejka libristo vortaron Schidlof de Fr. 20,—, tiu libristo ĝin mendis ĉe la Instituto kaj ricevis la revendistan rabaton. De tiu ĉi rabato, la kortrejka samideano akiris la profesor-an rabaton, kaj tiel okazas, ke li aĉetas ankaŭ en Kortrijk libron je la sama prezo, kiel ĉe ni, okaze de rekta senpera aĉeto, eĉ malplialte se oni konsideras la unuopan afrankelspezon. Kiel en ĉiu komerca fako, la nura diferenco estas, ke per tiu aĉet-maniero eksterstaranta peristo (libristo) akiras parton de la profito sur tiu libro.

La aserto, ke ni reprenas la 10 %an. rabaton, por afranko, estas tute malvera. Ni kalkulas nur la efektivajn send-elspezojn.

Ni estas do pravaj, dirante, ke via malbona fido estas klara ĉar vi ne faris eĉ unu klopodon por antaŭe kontroli la erarajn klarigojn. Tiu kontrolo estis por vi despli facila, ĉar vi mem jam ĝuis revendistan rabaton ĉe nia societo.

Kaj jen la plej grava kulpigo, kiu troviĝas en la artikolo "La Okuloj malfermiĝas", ĉar la aliaj riproĉoj pri prokrastoj kaj ceteraj ja temas pri okazintaĵoj de longe for, kies publikigo do estas duoble malhonestaj kaj mallojaj.

Post la febra laboro por la Universala Kongreso kaj ĝiaj sekvoj, la liverado de libroj okazas tute regule.

La afero pri la "telefonlistoj" en "Belga Esperantisto" ne rekte rilatas nin. Vi tamen estus povinta atentigi viajn legantojn pri la fakto ke la Kongresa Komitato de Antverpeno abonigis ĉiujn kongresanojn al "Belga Esperantisto", el kiu rezultis profito granda por la propaganda societo en la lando, kaj ke estus vere malĝentile la ununuran linion rifuzi, kiun ricevis en tiu listo ĉiu el la 1500 kongresanoj abonantoj. La ekzemplo estis tiom taŭga, ke de tiam ĝi estis imitata en

la postaj kongreslokoj. Kaj cetere la kutimaj abonantoj nenion perdis ĉar en 1928 la paĝokvanto de nia nacia revuo estis eksterordinare pli granda.

Pri la prokrasto en la apero de la revuo, ni same povas diri, ke temas pri fora estinteco, kaj ke nia nacia revuo nun aperas tiom regule kiom monata revuo Esperantista povas regule aperi.

Pri la personaj atakoj, kiuj en tiu Marta kaj en antaŭaj numeroj estis faritaj kontraŭ iu aŭ iuj gvidantoj de nia Belga movado Esperantista, rilate al liaj aŭ iliaj agoj, en aŭ ekster la Esperanto-Instituto, ni eĉ ne volas paroli, ĉar ĝis nun vi tamen ne jam presis, ke la gvidantoj de la Esp.-movado Belga estas ŝtelistoj aŭ mortigistoj kaj ĉar la aliaj personaj atakoj devas esti pardonataj al personoj, kiuj deflankiĝintaj de la bona vojo de lojala laborado por Esperanto, nur ankoraŭ sin okupas pri dividiga laboro, klopodante forpreni membrojn de unu societo aŭ grupo, anstataŭ klopodi interesigi eksterstarantojn, ne-esperantistojn, al nia movado.

Krom tio *via* flandra movado efektive nenion intencas. Ĝi ne volas, flanke de la Belga, ekster la Belga eĉ, varbi novajn Esperantistojn, ĝi precipe kaj nure kontraŭbatalas la ekzistantajn organizaĵojn. Vi volas detruĝi ĉion kio enhavas la nomon "Belga", ĉu tio nomiĝas "Belga Ligo", "Belga Esperantisto", aŭ "Belga Esp.-Instituto", kaj por tio ĉiaj rimedoj estas bonaj. Tiel ĝi ne agas laŭ la deziro de la flandroj, sed nur laŭ tiu de la "Front"-partio, politika partio en kies hejmo cetere la movado naskiĝis.

Tial la represoj ne estis certigi aŭ plifaciligi la bonan laboron de viaj organizaĵoj sed vere malutili la laŭ vi detruindan "Belga Esperanto-Instituto"-n. Tion ni ne povas permesi, kaj tial ni respondis. Ne kredu tamen, ke ni mem per samaj rimedoj atakos. Ni ĉiam memoras pri la versoj de granda "franca" poeto Victor Hugo, kiujn ni tradukas:

"Kiam infan' naskiĝas

La familio per grandaj ĝojkrioj aplaudas"

kaj ni malgraŭ ĉio esperas, ke viaj ĵusnaskiĝintaj infanoj povu esti feliĉaj kaj prosperaj laŭ Esp.-vidpunkto, kaj ni sincere deziras al la familianoj, ke neniam troviĝos inter ili, iuj, kiuj iam sekvos la malbonan ekzemplon, kiun vi nunmomente donas, ne irante vian vojon, sed malhoneste insidante kontraŭ viaj ĝisnunaj kunlaborantoj kaj amikoj, kiujn vi malprave mallojale kaj malĝentile dorsflanke atakas.

Ni prezentas al vi, Sinjoro Administranto-Redaktoro, niajn salutojn.

Belga Esperanto-Instituto

(Koopera Societo)

La Admin.-Delegito,

Maurice Jaumotte.

La Adm.-Prezidanto,

Fr. Schoofs.

Nia respondo.

Ni esperas, ke niaj legantoj havis la necesan paciencon por finlegi la epistolon de la du nuraj gvidantoj de la Belga Esperanto-movado.

La intenco de ambaŭ honestaj, lojalaj sinjoroj estis tro klara: mal-bligi la aperon de nia Aprila numero. Ni notu, ke ili ankaŭ volis timigi nian presiston per registrita rapidkuriera letero kaj post ties humoraĵa respondo per nova registrita letero, en kiu ili grandanime minacis lin per monpuno de 30-foje 20 guldenoj!

Kaj ĉio tio pro artikolo, kiun ni represis el "*Nia Informilo*" de la Kortrijka Grupo, por montri, ke en pli ol unu loko oni ne plu estis kontenta pri la agado de la Belga Ligo-estraro, kiu fakte nur ekzistas el ambaŭ redaktintoj de la supre represita letero. La prezidanto de la Belga Ligo kaj ni, ni ambaŭ havis antaŭ nelonge la okazon klarigi nian sintenadon antaŭ la Kortrijka grupo; niaflanke ni estas trankvilaj pri la impresio, kiun ni postlasis en Kortrijk; — ĉu aliflanke oni estas pri tio same trankvila?

Ne, ne! nia intenco ne estis malutili al via komerca firmo, honestaj kaj lojalaj sinjoroj! Estu trankvilaj, ni ne celas vian monujon!

Ni scias, ke en komercaj aferoj vi estas pli spertaj ol ni! Ni memoras interpaladon dum kiu iu i. a. diris, ke neniu povis riproĉi al ni, ke ni estas pagataj de la... Frontpartio por la redaktado de "*Flandra Esperantisto*", kaj kiu je nia deklaro, ke ni ne estas pagataj por tiu laboro kaj la kaslibro estas je lia dispono por kontrolo, respondis, ke tio ne estis pruvo por li, ĉar... kaslibro oni povas enskribi laŭplaĉe! Denove, en tiuj aferoj ni ne estas tiel spertaj kiel la honestaj kaj lojalaj sinjoroj!

Kvankam ni ricevis pri Belga Esperanto-Instituto pli ol unu leteron, kiun ni povus froti sub la nazon de ambaŭ administrantoj ni ne plue parolos pri tiu komerca firmo, por montri, ke ni vere ne volas malutili al ĝi!

Ni tamen volas atentigi la honestajn kaj lojalajn sinjorojn pri la fakto, ke nia "*Flandra Esperanta-Instituto*" ne estas... "firmo". Ni esperas, ke ni baldaŭ definitive povos laŭleĝe starigi ĝin kiel "societo sen profita celo". En nia revuo ni havos ankoraŭ la okazon por paroli pri la rolo de Esperanto-Instituto, kiu laŭ nia kompreno devas esti antaŭ ĉio ne profitdona, sed kultura. Kaj ĉi tia nia "*Flandra Esperanto-Instituto*" devas iĝi!

Pri "*Belga Esperantisto*": ŝajnas, ke la paĝokvanto gravas, ne la enhavo! Krom tio, estas fakto, ke ĝi laŭ nia scio antaŭe neniam regule aperis; ĝia direktoro mem devis rekoni, ke estis nur depost kaj per la apero de "*Flandra Esperantisto*", ke ĝi reviviĝis.

Pri sia kontraŭ-flandra sintenado dum siaj naciaj kongresoj (kaj aliaj okazoj!) la sinjoroj singarde silentas!

La atakoj kontraŭ nia persono estas tro ridindaj! Ambaŭ honestaj kaj lojalaj sinjoroj mem ne kredas, kion ili tiurilate diras! Estas nur diroj, pravigitaj per neniu fakto!

La poresperanta laboro, kiun ni ĝis nun faris per persona propagando, kursoj, paroladoj kaj kunlaborado al diversaj esperanto-revuoj estas sufiĉe konata, por ke ni insistu pri tio.

Niaflanke ni ĉiam malkaŝe, kun malfermita viziero, atakis la fariseojn de la esperanto-movado, dum ili kaŝe jam pli ol unufoje fosis por ni puton... en kiun ili ĉiam mem enfalis!

Ili do diru, la honestaj kaj lojalaj sinjoroj, kiam kaj kie ni mallojale agis dum ni estis membro de "Belga Ligo" kaj kunredaktanto de "Belga Esperantisto"! Ni estas trankvilaj pri tio!

Niaflanke, ni povas citi — kaj ni citos — pli ol unu ekzemplon pri la kontraŭ-flandra agado de la prezidanto de la "Belga Ligo".

Estas li mem, kiu montris al ni, ke la loko de la flandraj esperantistoj ne estas en "Belga Ligo", kiu estas gvidata de nur du personoj, el kiu unu opinias, ke esperanto estas "industrio" kaj la alia, ke estas "ŝercaĵo"; — en ligo, kies prezidanto opinias, ke "diktatoro" estas necesa (la necesa "diktatoro" kompreneble estas li!); — en ligo, kie la flandroj — malgraŭ sia plimulto — ĉiam estis konsiderataj kiel pariaoj. Estas li mem, kiu necesigis la fondon de "Flandra Ligo Esperantista"!

Ĉu la honestaj kaj lojalaj sinjoroj metante "franca" inter krampetoj volas kredi, ke ni malamas la francan? Tiam ili eraras! Ni fieras pri la fakto, ke ni almenaŭ scias dekfoje pli pri la franca literaturo kaj kulturo ol la francema direktoro de "Belga Esperantisto", kiu fermas siajn fenestrojn por ĉiuj modernaj spiritfluoj. Ni ŝatas la literaturon kaj kulturon de ĉiuj fremdaj popoloj, sed pro tio ni despli amas nian propran popolon kaj edukigas niajn infanojn per propra lingvo kaj ne anti-pedagogie per fremda.

Ni montros aliokaze kiel oni agas en la Belga Ligo-rondo inter kunlaborantoj kaj amikoj.

Pri dorsflankaj atakoj ambaŭ honestaj kaj lojalaj sinjoroj-same kiel en komercaj aferoj — estas pli spertaj ol ni kaj — kiel la lupoj en l'arbaro — ili iam formanĝos unu la alian, ĉar — laŭ propra diro de unu el ili — la prezidanto de la Belga Ligo staras aŭ falas kun li.

Sufiĉas por nun: ni pli ol unufoje reprimtrakto en niaj sekvontaj numeroj la leteron de la firmo Schoofs kaj Jaumotte.

Se tiuj honestaj kaj lojalaj sinjoroj kredis knock-outigi nin per sia letero, ili eraras! Jen: ni invitas la direktoron de "Belga Esperantisto",

al publika debato, dum kiu li povos ripeti kaj pruvi siajn kulpigojn kontraŭ ni! Tiu debato okazu iun dimanĉon posttagmeze, por ke la esperantistoj el la najbaraj lokoj havu okazon por ĉeesti ĝin. Sinjoro diktatoro, se vi ne akceptas, vi estas malkuraĝulo!

Ni ne havas milojn da frankoj je nia dispo, sed ni posedas entuziasmon, kaj kun entuziasmo sen mono oni — laŭ nia kredo — pli multe atingas ol per mono sen entuziasmo!

Vivu Esperanto!

Jan van Schoor

AL NIAJ AMIKOJ! La gvidantoj de “Belga Ligo” minacas per la belga rasojuĝo nian revuon! Jen la momento por apogi ĝin per varbado de novaj abonantoj kaj subteni ĝin per malgranda aŭ... granda mondonaco, plej... sonanta respondo al la atakoj de niaj belgaj... samideanoj!

Flandra Esperantisto.

FARISEOJ.

Fariseoj, for la maskoj!
Ne plu helpas kontraŭstar',
mensogado, kalumnio
kaj kutima via far'!
Ĉar vi mem nun klare montris
kion vere vi alcelas!
Iĝas tempo, ke ni nepre
el la templo vin forpelas!

Fariseoj, Esperanto
por vi estas nur komerc'
kaj labor' por idealo
estas al vi tem' por ŝerc'!
La ideojn de la Majstro
malhoneste vi perŝidas!
Tuta via idealo
en monujo via sidas!

Fariseoj, vian koron
jam ekkaptas maltrankvil',
ĉar malrektajn viajn dorsojn
batas nia balail'!
Vi ekkrias timiĝantaj
pro la fariĝanta lumo,
pro krakanta via “firmo”
kaj “honesto(?) la rentumo”!

Fariseoj, malantaŭen!
Eluzitaj estas vi!
Kun pli noblaj, junaj pensoj
lokon por generaci',
kiu ne plu rezisteble
staras jen en Flandrolando
kun fervora sia amo
por mondpac' kaj Esperanto!

JAN VAN SCHOOR.

CATALANS !

Catalans, que serveu viva
vostra llengua nacional
que dels trobadors encara
té la glòria medieval;
que a través de tots els segles
feu florir per sempre l'art;
Catalans, amb simpatia
us adreça el món l'esguard !

Catalans, la pròpia llengua
és del poble el gran tresor :
hi batega nostra vida,
l'amor nostra, el nostre cor.
No vengueu la llengua vostra
per un ídol estranger !
Catalans, rera la llengua
prompte el poble mort també !

Catalans, molts de vosaltres
en exili van caient
o en presó, mes vostra causa
la fa santa el sofriment !
Vostra sort, vostre pervindre
Déu tan sols els té en la mà.
Catalans, no tremolèssiu
per un dèspota i tirà !

Catalans, tingueu coratge
El futur es va acostant :
sobre els seus fonaments febles
el vell món es va esberlant !
A l'orient, per a vosaltres
surt un sol de llibertat !
Catalans, totes les terres
tenen lloc assenyalat !

Catalans, la vostra pàtria
no té estat independent
que sols és avui factible
per la lluita violent !
Doncs la llibertat guanyeu-vos
i que cessi el vostre afront !
Catalans, no us oblidèssiu
que us esguarda tot el món !

Escrit originalment en esperanto per JAN VAN SCHOOR, flamenc.
Aparegut a la revista " *Flandra Esperantisto*", agost 1929.

Traducció catalana de X.X.X.

Ni ĉi supre prisis la katalunan tradukon de la poemo "Katalunoj!", kiu aperis en nia numero de Aŭgusto. Niaj legantoj kun intereso povos kompari la esperantan kun la kataluna teksto. Ni mem ne konas la nomon de la verkinto sed tamen laŭ ĉi tiu vojo jam kore dankas lin pro la alsendo de lia traduko kaj aldonas niajn plej sincerajn bondezirojn por lia patrujo: la bela Katalunujo !

Flandra Esperantisto.

ESPERANTO-EKZAMENOJ.

La Esperanto-ekzamenoj pri simpla kaj supera kapableco, organizitaj de Flandra Esperanto-Instituto, okazos en Antverpeno dimanĉon la 25an. de Majo 1930, je la 10a. matene.

Esperantistoj, kiuj deziras partopreni, sciigu tion kiel eble plej baldaŭ al f-ino Martha Vervloet, Gravinstraat, 32, Borgerhout-Antwerpen, kaj aldonu 10.— fr. por la kostoj.

Partoprenantoj, precipe eksterurbanoj, kunportu manĝaĵojn.

Programo :

a) *Simpla Kapableco* :

I Skriba parto :

1. Diktaĵo (15 p.)
2. Gramatiko. Eventualaj klarigoj estas permesataj flandralingve (15 p.).
2. Tradukaĵo el flandra lingvo (15 p.).
4. Redaktaĵo : laŭvola pritrakto de unu el tri temoj (25 p.).

II Parola parto :

1. Legado el Krestomatio de Zamenhof (15 p.).
2. Parolado dum 5 minutoj pri temo el la ĉiutaga vivo (15 p.)

b) *Supera Kapableco* :

I Skriba parto :

1. Diktaĵo (15 p.).
2. Gramatiko. Eventualaj klarigoj esperantlingve (15 p.).
3. Tradukaĵo el flandra lingvo (15 p.).
4. Redaktaĵo : a) Komerca letero (10 p.).
b) Pritrakto de temo (20 p.).

II Parola parto :

1. Klarigo de kelkaj gramatikaj malfacilaĵoj el la legaĵo (10 p.).
2. Parolado dum 5 minutoj pri iu ajn temo (15 p.).

Flandra soldato rifuzas obei francajn ordonojn.

La antverpena soldato Joris De Leeuw, enkazernigita en la valona urbo Namur, de l' komenco de sia soldatiĝo rifuzis plenumi francajn ordonojn pro principaj kialoj. Li estis pro tio enkarcerigita kaj deklaris al sia kolonelo : " Mi volas protesti kontraŭ la leĝo, kiu altrudas al Flandro francan ordonon. Ĉi tiu leĝo estas kontraŭa al la konstitucio, kiu garantias la lingvan liberecon." Poste li petis sian kolonelon, ke ĉi tiu punu lin per ĉiuj eblaj punoj por ke li povu kiel eble plej baldaŭ aperi antaŭ la Milita Kortumo, ĉar se oni liberigus lin, li denove rifuzos obei francajn ordonojn.

En Namur jena afiŝo estis legebla sur la muroj de la urbo :


“ Namuranoj, en la malliberejo de la soldatmalsanulejo en Antverpeno estis enkarcerigita valona soldato, ĉar li rifuzis obei flandran ordonon. Ĉu vi komprenas la humiligon, la insulton, altrudatan al viaj valonaj filoj? Ili estas komandataj per fremda lingvo kaj je kontraŭstaro en karcerigataj en la malliberejo! Kiom longe vi toleros ankoraŭ tiun subpremado de viaj filoj, dum ili servas la landon?

“ Estas verdire renverse. Flandra soldato, naskiĝinta kaj loĝanta en Antverpeno, estis enkazernigita en Namur kaj rifuzis obei ordonon faritan al li franclingve. Li estas nunmomente enkarcerigita en la malliberejo de la soldatmalsanulejo.”

Intertempe De Leeuw estis kondukita de Namur al Lieĝo, de Lieĝo al la malliberejo de Sint-Gillis kaj de tie al Antverpeno. *De Sint-Gillis al Antverpeno li estis kondukita kune kun murdisto!*

La parlamento voĉdonis, ke parlamentano Herman Vos povos urĝe interpelacii ministron de Broqueville pri la afero De Leeuw la 6an. de Majo.

La gazeto “*De Standaard*” skribis: “La rifuzo de soldato Joris De Leeuw obei francan ordonon ne estas ago de kontraŭstaro kontraŭ la aŭtoritato, ĉar la knabego estas preta ekzemple fari sian servon. Temas ĉi tie pli pri alta principo: la rajto de popolo esti edukata kaj komandata per propra lingvo en la armeo. Temas pri ĉi tiu demando: Ĉu Flandro estas devigata kompreni la francan? La Konstitucio ja garantias la lingvan liberecon en Belgujo. La Flandroj estis ĝis nun dresitaj en la armeo kiel simioj kaj papagoj.”



El “La Liberiĝo de la Nacioj”.

Malgrandaj, progresmalfruiĝintaj nacioj estas sorbataj de grandaj aŭ pli altevoluintaj: tiu procezo estas nerezistebla por multaj malgrandaj nacioj, sed ne por ĉiuj.

La sennaciig-procezo de malgranda, kampkultura popolo trovas fortan kontraŭtendencon tie kie ĝin kaptas la movado de la moderna demokratio. En interligo kun tiu movado, tiu popolo kreas propran klason de intelektuloj kun propra skribata lingvo kaj forta literaturo; la lingvo taŭgiĝas ne nur por poezio, sed ankaŭ por prozo.

Beletristikon povas havi ankaŭ dialekto. Sed nur per ĉiutaga uzado en gazetoj kaj en leteroj, en instruoj kaj en la popularscienca literaturo, la skribata lingvo fariĝas lingvo de la popolamaso, politika faktoro; kaj nur tiel la popolamasoj ĝin uzantaj fariĝas moderna nacio. De post kiam popolo atingas tian nivelon, ĝi estas kapabla je nekredbla obstinemo por konservi sian lingvon.

KARL KAUTSKY.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA.

Dimanĉon la 18an. de Majo okazos en Gent la 1a. kunveno de "Flandra Ligo Esperantista" en la etaĝa salono de la kafejo "De Hazewind", Koornmarkt.

La kunveno daŭros de la 10a. ĝis la 12a, kaj de la 2a. ĝis la 4a. kaj estos gvidata de nia samideano, advokato Jozef Muys el Mechelen.

Al tiu kunveno estas invitataj ĉiuj flandraj esperantistoj, kiuj volas kunhelpi al la starigo de flandra ligo. Grupoj, kiuj interesas pri la afero, sendu ĉu oficiale, ĉu neoficiale delegiton.

La flandraj esperantistoj aŭ grupoj, kiuj ne ricevus apartan inviton, bonvolu konsideri ĉi tiun alvokon kiel tia.

Ni nepre kalkulas je la ĉeestado de samideanoj el Aalst, Antverpeno, Bruselo, Gent, Kortrijk, Liero, Mehleno, Sta Nikolao kaj aliaj lokoj kie oni salutis la fondon de propra Ligo kun entuziasmo.

Flandraj esperantistoj, la tempo por agado estas alveninta! Ĉu vi rigardos kun krucigitaj brakoj la laboron de l'aliaj, aŭ ĉu vi kunhelpos?

BIBLIOGRAFIO.

(Ni recenzas duope senditajn verkojn, unuopajn ni citas.

Ĉiu verko estas havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituto.)

Kvin Vivokantetoj. — Tekstoj originale verkitaj de Catherina J. Roskes-Dirksen; muziko de H. Windisch-Sartowsky. Eldonis la poetino kaj la komponisto. 12 paĝoj; 27×34 ½ cm. Prezo: fl. 0,90.

Kun la poetino de ĉi tiuj kvin vivokantetoj la legantoj de "Flandra Esperantisto" jam pli ol unufoje interkonatiĝis. Ili scias, ke s-ino Roskes celas simplecon, sed ke simple ŝi ion sincere eldiras.

Same simpla kiel la versaĵoj estas la muziko per kiu s-ro Windisch ilustris ilin. Solena la akompanado estas por "Se la homo" kaj "Majstro", kaprica por "La Flirtemulo", ĝentila por "Knabino" kaj gracia por "La Surprizo". La komponisto montras, ke li kapablis tute unuigi sian inspiron kun tiu, kiu kaptis la poetino kiam ŝi verkis la poemojn. Malofte ni renkontis tian harmonion inter teksto kaj muziko kiel ĉe ĉi tiuj vivokantetoj.

La fortepiana akompanado estas facila; oni ne devas esti virtuozo por kapabli ludi ĝin. Do ĉiu esperantista muzikamanto havigu al si tiun eldonaĵon kaj kuraĝigu tiamaniere poetinon kaj komponiston. — JAN.

Esperantuja Kanto. — Teksto de Cath. J. Roskes-Dirksen; muziko de Hugo Nolthenius. Eldonis la poetino. 17×27 cm. Prezo: fl. 0,20.

La tekston de ĉi tiu kanto ni presis en ĉi tiu numero de nia revuo; niaj legantoj do mem povas juĝi pri la versoj de s-ino Dirksen.

S-ro Nolthenius verkis indan muzikon por la poemoj! De l' komenco la melodio kaptas nin kaj pli kaj pli forte kuntrenas nin ĝis la fino.

Jen kanto, kiun oni devus lerni en almenaŭ ĉiu grupo. Mi ĉiam miris pri la fakto, ke oni tiom malmulte kantas en esperantistaj rondoj (kaj se oni kantas, estas plejofte malbone). Esperantistoj, kantu! disaŭdigu ĉi tiun esperantujan kanton! Nur la malbonuloj ne kantas, diras flandra proverbo. — JAN.

Bengalaj Fabeloj. — Originale verkis Lakshmiswar Sinha. Eldonis Eldona Societo Esperanto, Stockholm, 40 paĝoj; 13 $\frac{1}{2}$ × 19 $\frac{1}{2}$ cm. Prezo: 1 sveda krono.

Aan den Vlaamschen Yzer de Reimond Sanders. 2a Eldono: "Volksverheffing", Aalst, 216 paĝoj; 16 × 21 cm. Prezo: 15 fr.

Reimond Sanders senkaŝe rakontis longe antaŭ Remarque la suferadon de la frontsoldatoj. — la senesperan, senkonsolan luktadon kontraŭ la fataleco, kiu disŝiris ilian korpon kaj mortigis ilian animon.

Rakonto de la enhavo estas neebla; oni devas legi la libron. Niaj flandraj kaj holandaj samideanoj interkonatiĝu kun ĉi tiu flandra kulpigo kontraŭ la milito. — JAN.

RICEVITAJ REVUOJ.

Antaŭen, Dec.-Marto; Breiz-Atao, 93, 94, 95, 96; British Esperantist, 300; Dordrechta Esperantisto, 15; Espero Katolika, 77, 78; La Etulo, 22; Hispana Esperanto, 2-3; Holanda Esperantisto, 105, 106; Informoj de E. A. E., 3; Internacia Medicina Revuo, 2; Internacia Stenografisto, 33; International Language, 7; Laborista Esperantisto, 4; Marto, 3; La Movado, 131; Multlingva Intersteno, 1; Nord-Okcidento, 9; Ondo de Daŭgava, 3; Oomoto, 3; Oomoto Internacia, 40 a; Pola Esperantisto, 1-2-3; La Progreso, 3; Schola et Vita, 1-3; Sennaciulo, 286; Svenska Esperanto-Tidningen, 3; Tutmonda Intersteno, 1; La Unuigita Tuthomaro, 4; Vegetarano, 1.

Wegens plaatsgrebrek moest de tiende en laatste les van "ESPERANTO DOOR ZELFONDERRICHT" verschoven worden tot ons volgend nummer.

INTER NI

El Sta. Nikolao. - Al Triumfo. — La 16an. de Marto kelkaj el niaj membroj ĉeestis la pulĉinelan vesperon de la Flandrema Grupo el Antverpeno. Ili bone amuzis sin kaj ne rapide forgesos tiun agrablan vesperon. (Valentine, Anna kaj Yvonne kore salutas Pallieter la dik-egan !)

Hungara vespero okazis sabaton la 5an. de Aprilo; ĝi bonege sukcesis dank' al sindona helpo de f-ino Truyens kaj s-ro Koekelbergh. Post salutparoladoj de s-ro Van Ghendt kaj s-ro Lucas, nia hungara grupano surprize nacilingve bonvenis la du vizitantojn. Sekvis interesplena vojaĝo lumbilde tra Hungarujo dum gramofona akompanado de belegaj hungaraj kantoj. S-ro Puskas nacilingve dankis la hungarajn Al-Triumfanojn kaj poste esperante la ĉeestantojn. Post la kunveno okazis intima kunestado en la kafejo "Rubenspaleis" kaj ĝis malfrue en la nokto oni bonege sin amuzis. S-roj Lucas kaj Puskas konfesis, ke Sta. Nikolao kortuŝe akceptis ilin kaj ke ilia restado en nia urbo estas neforgesebla. Denove do la flandraj esperantistoj montris al fremdlandanojplej Zamenhofan spiriton kaj amon.

La 11an. de la sama monato nin vizitis surprize S-ro Ernest Maguire el Perth (Aŭstralujo), kiu pere de Esperanto piede trakuras la mondon jam depost 1927 kaj nur revenos hejmen en 1934. Li sukcesplene paroladis pri sia lando kaj spertoj faritaj dumvoje. Ankaŭ dum tiu ĉi vespero regis vera esperanta atmosfero kaj antaŭ ol foriri Genton, nia kuraĝa aŭstrala samideano afable audiaŭis la grupon per vizito sabatmatene al nia sekretario.

Preskaŭ ĉiuj gegrupanoj nun korespondadas kun eksterlandaj geamikoj kaj ĉiusemajne ni povas konstati, ke la Sta. Nikolaa prozo estas ŝatata de la eksterlandaj samideanoj.

El Hoboken. — Hobokena Grupo. — La 27an. de Aprilo okazis en la salono de nia sidejo propagandaj paroladoj pri Esperanto de Jan Jacobs, prezidanto de la Antverpena por Esperanto Propaganda Komitato, kaj Jan Van Schoor, prezidanto de Flandrema Grupo Esperantista el Antverpeno. Ambaŭ paroladoj akiris multe da sukceso kaj estos fruktedonaj por la baldaŭ komenconta kurso, organizita de nia grupo kaj kiu okazos en komunuma lernejo.

El Antverpeno. — Flandrema Grupo Esperantista. — Dum la Pasko-tagoj kelkaj el niaj membroj kampadis en la arbaroj de Westmalle; la flandremuloj nenion timas, eĉ ne la naturon: ili tro amas ĉi tiun.

Sabate la 26an. de Aprilo-demokratia laŭ prezo sed reĝa laŭ la manĝaĵo-festeno kunigis niajn fidelajn gemembrojn. Piet per sia manĝemo havigis bonan apetiton al la aliaj. Estis vera Brueghela festeno

kiun ĉiuj agrabligis per sia bonhumoro. Estis bona ekzercio por la kongresa festeno!

Kelkaj el la gelnantoj de la ĵus finiĝintaj kursoj partoprenos la Esperanto-ekzamenojn de la Flandra Esperanto-Instituto, kiuj okazos la 25an. de Majo en Antverpeno.

Multaj el niaj membroj iros la 18an. de Majo al Gent por ĉeesti la kunvenon de Flandra Ligo Esperantista kaj tie interkonatiĝi kun samideanoj el ĉiuj anguloj de Flandrujo.

LINGVOJ KAJ IDIOMOJ

La Angla, la Franca, k. t. p., estas lingvoj. Sed la Germana, la Flandra, la Bretona, k. t. p., estas idiomoj. Tion decidis Universala Esperanto-Asocio. Vidu ĝian Jarlibron por 1929, p. 183.

Kiel diferenciĝas idiomoj kaj lingvoj? Estas stranga fakto, ke la vorto "idiomo" ŝajnas iom maltrankviliga. Lingvo estas idiomo. Ĵargono estas ankaŭ idiomo. Kaj, se via idiomo ne estas lingvo, kion do vi opiniu pri ĝi?

Ni plue diru, ke inter la gazetoj publikigataj en Francujo, la Jarlibro ne mencias NORD-OKCIDENTON kvankam ni sendis ĉiam regule kaj duope ĉiujn numerojn al UEA.

Ĉu UEA opinias, ke Bretonujo ne estas parto de Francujo? Ĉar UEA ne diferencigas Franc-ujon de Franc-ŝtato, tio ne estas kredebla.

El „Nord-Okcidento”.

SUBTENO POR NIA REVUO.

Hendrickx, 15. —; Naĉjo, 10;—; monkolekto en la kafejo "Breughel" ĉe Tuur post kanto de Ward Van Trier, 22.80; Piet, 20.—; Mart, 10.—; Jan, 10.—; Jef, 10.—; Jos, 10.—; Glöckner, 10.—; entute: 117,80 fr.

AL NIAJ AMIKOJ. — Belgflanke oni klopodas kredigi, ke ni estas subtenataj de la... Frontpartio, kiu siaflanke — laŭ tiuj sinjoroj — estas subtenata de el Berlino kaj Moskvo!! Bedaŭrinde, tiuj sinjoroj mensogas: ĝis nun ni vane atendis la alvenon de markoj kaj rubloj kaj devis... alparoli nian propran monujon. Amikoj de "Flandra Esperantisto", helpu nin: via subteno estos la plej trafa, la plej sonanta respondo al la kalumniaj, mensogaj diroj flanke de certaj Belga Ligestraranoj!

Flandra Esperanto-Instituto

Gravinstraat, 32
BORGERHOUT-ANTWERPEN
Poŝtĉekkonto 2427.03

Presado - Eldonado - Librovendado
Propagando - Instruado.
Petu niajn prezojn !

ESPERANTISTEN !
BLINDENVRIENDEN !
ABONNEERT U
op het maandblad van het
Algemeen Blindenverbond
van Vlaanderen
29, Rijselsche baan, Antwerpen - West
Jaarlijksche bijdrage : 10, 30 of 100 frank.
Postcheck 195.224.
Helpt daadwerkelijk de
Vlaamsche blinden.

Ĉiu literaturema esperantisto devas
posedi la belegan poemaron

AMO KAJ POEZIO

de Jan van Schoor
kaj LA DU AMATINOJ

kun

LA KAPRICOJ DE MARIANO

de Alfred de Musset,

Tradukitaj de Jan van Schoor
kaj rekomendita de Esperantista
Literatura Asocio.

La prezo estas nur po 2 belgoj (send-
kostoj enkalkulitaj).

Ambaŭ verkojn mendu ĉe „Flandra
Esperantisto” aŭ ĉe „Flandra Espe-
ranto-Instituto”.

PAUL KUTSUKIAN.

Ĝenerala agento por la provincoj
Antverpeno, Okcident-kaj Orient-
Flandrujo de la aŭtomobiloj kaj
ŝarĝveturiloj

REO

Ĝenerala agento por la provinco
Antverpeno de la tirveturiloj

INTERNATIONAL

TELEFONOJ : 916.48 - 985.15

Laborejo kaj Ekspozicia salono :
BELGIËLEI 149, ANTWERPEN.

Algemeen Vlaamsch Huis

„MALPERTUUS”

S. POT - HANSEN

Frankrijklei, 8 - Antwerpen.

Bekend voor zijn extra dranken

o. m. Dortmunder, Spalterbräu,

Leeuwenbier.

Goed koud buffet

Goede bediening.

HUIS DE LEY

Driekoningenstraat, 43, Berchem.

De Ley & Verschueren

CITÉ

N^{rs} 143-144-145-146-147-179-180-
208-209

Groote keus in Vrouw- Manstoffen
Zijde, Fluweel en Voeding.